

la Espero

1990:4

SVENSKA

ESPERANTOTIDNINGEN

Kubo: ne nur tabako kaj sukero, sed ankaŭ...



"Vi venkos, ĉar via ideo estas bona" estis la mesaĝo de Fidel Castro al la esperantistoj kongresantaj en Kubo

ANONCETOJ

Ciu linio kostas 10 kr. Malplej alta kosto 50 kronoj. Anoncetoj konsistas el maksimume dek linioj. Mendu ĉe la redaktanto.

Ĉu vi volas korespondi?

Ne skribu al UEA-delegito aŭ al la redaktanto de iu gazeto. Ili ne povas helpi al vi, se vi ne mendas pagitan anonceton. Skribu al Koresponda servo mondskala, S-ro Robert Llorens, Les Hortensias 2, 121bis Boulevard Napoléon III, F-06200 Nice, Francio.

Donu la sekvajn informojn: nomo, adreso, sekso, aĝo, profesio, geedza stato, kiom da korespondantoj dezirataj, en kiuj landoj kaj pri kiuj temoj. La servo ne agnoskas ricevon de via peto, sed tuj pludonos viajn informojn al korespondemulo(j), kiu(j) konformas al viaj deziroj. Aldonu internacian respondkuponon, kiun vi aĉetas en poŝtofiĉejo.

Multaj esperantistoj el aliaj landoj volas korespondi kun svedoj. Do vi havas grandan ŝancon ricevi respondon.

DONACOJ

Esbjörn Stridell, Garpenberg 25. C G Ingestedt, Vällingby 300. Harry Victorin, Arboga 100. Gunnar Åsemyr, Stenungsund 75. Rune Ekmark, Sandviken 75. Estrid Lind, Krylbo 200.

Okaze de 65-a naskiĝtago de Sven Strandberg: Lunds esperantoklubb, 200.

Klubo Cent: Gävle esperantoförening 100. Tore Johansson, Kalmar 100. Signhild Johansson, Kalmar 100.

SEF dankas pro la donacoj. Novaj kontribuoj estas bonvenaj al Esperantoforbundet, poŝtgiro 20 12-3.

La Espero

Organ för Svenska Esperantoforbundet

Adress: EsperantoCentro, Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm, tel. 08-11 74 34

Ansvarig utgivare: Leif Nordenstorm

Redaktör: Leif Nordenstorm, Munkebergsgatan 38, 3 tr., 951 56 Luleå, tel. 0920-279 78

Sättning: Per Aarne Fritzson och Leif Nordenstorm

Utformning: Omnibus, Tyresö

Tryck: EsperantoCentro, Stockholm 1990

Esperantoforbundet

Adress: EsperantoCentro, Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm, tel. 08-11 74 34

Öppettider: Vintertid alla vardagar, men säkrast måndag och torsdag kl. 11 - 13 och 17.30 - 19.

Postgiro: 20 12-3, Esperantoforbundet

Medlemsavgift 1990: Direktansluten medlem 125 kr. Familjemedlem (utan tidning) 50 kr. Ungdomsmedlem (max 20 år) 50 kr.

Enbart prenumeration: 125 kr. Gåvoprenumeration till utlandet: 65 kr.

Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlemsavgiften.

Medlemmar under 30 år är samtidigt medlemmar i Sveriges Esperantisters Ungdomsforbund och får dess tidning *Kvinpinto*. Om du inte får den, meddela ditt födelseår till EsperantoCentro.

SEFs styrelse

Ordförande: Karin Lindquist, Västermovägen 19, 732 49 Arboga, tel. 0589-155 31 (Nordiskt samarbete)

Vice ordförande: Märtha Andréasson, Tolsered Pl. 2265, 425 90 Hisings Kärra, tel. 031-57 11 33 (Årskongresser, ekonomifrågor)

Sekreterare: Ulla Luin, Myggdalsvägen 123, 135 42 Tyresö, tel. 08-712 82 91 (kansliet, massmedier)

Kassör: Börje Andersson, Ingegatan 4A, 541 50 Skövde, tel. 0500-122 05 (massmedier)

Styrelseledamot: Kerstin Rohdin, Fack 142, 579 00 Högsby, tel. 0491-204 61 (turnéer, bibliotek)

Styrelseledamot: Bertil Andreasson, Södra Rörum Pl. 455, 242 94 Hörby, tel. 0415-501 52 (utbildning, nordiskt samarbete)

Styrelseledamot: Haldo Vedin, Jordbrogatan 57, 603 64 Norrköping, tel. 011-17 36 87 (intern.org.)

Suppleant: Per Aarne Fritzson, Möregatan 9, II, 116 27 Stockholm, tel. 08 - 40 88 92

Suppleant: Leif Nordenstorm, Munkebergsgatan 38, 3 tr., 951 56 Luleå, tel. 0920-279 78

Esperantoförlaget

Postadress: Box 7502, 200 42 Malmö

Besöksadress: Möllevångsgatan 20B, Malmö

Telefon: 040-12 20 29

Postgiro: 578-5

Öppettider: 1 september - 15 maj: onsdagar 10 - 11, torsdagar 17 - 18. Skriftliga beställningar expedieras under hela året.

Expedition: Wivi Nilsson

Styrelsens ordförande: Tomas Jansson.

Enhavo

- UK EN KUBO:
52 Bona kongresejo kun surprizaj programeroj
53 Sentoj bolis pri buĝeto dum komitataj kunsidoj
54 Lando de cigaroj kaj sukero - kaj de amika popolo
55 Golfo de Porkoj. Inhibita porkaĵfesteno
Kelkaj (ne tute ĝentilaj) vortoj pri Aeroflot
56 Sako - la reĝa ludo, ludata en ĉiuj landoj
Monologo
57 RECENZOJ:
La dek du noktoj de Satano
Noktaj aviadistoj
Trezoro
58 TRA LA LANDO:
Pipi Ŝtrumpolonga premiita
Komputila programo
Somere en Karlskoga
... kaj en Kungälv
Freinet instruistoj en Svedio
Utländska besök under hösten och våren
59 TRA LA MONDO:
Filmo pri Bergen
Pola radio bone aŭdebla
Kristanoj en Francio
60 NIA LINGVO:
La plago de paronimoj en Esperanto
62 Krucvorta enigmo
63 KALENDARO
Nekrologo: Agda Olsson
64 Fidel Castro dum la UK

Prezidanto:

Esperanto plilongigas la bonan vivon...

Post belaj someraj tagoj mi esperas, ke vi estas plenaj de laboremo por esperanto. Multaj certe ricevis ekstran injekcion de emo fari grandlaboron, partoprenante la kongreson en Karlskoga Popolaltlernejo. Tiam oni sentis, ke esperanto havas rolon en nia socio - ke ni estas survoje...

Kiel mi diris dum la inaŭgura parolo de la kongreso, Karlskoga estas nia lingva Esperanto-Centro. Sed por ke ĝi restu tia, estas necese, ke daŭru la 8-semajnaj kursoj. Ni devas ĉiuj agi por ebligi tion. Se ili ĉesus, esperanto malantaŭeniras en Svedio, laŭ mi. Kompreneble gravas la kursoj aranĝataj de studorganizoj, same la semajnfinaj kaj aliaj kursoj. Sed la kursoj en Karlskoga estas regulaj kaj kompletaj, kaj donas pli da reklamo por esperanto dum la tuta jaro.

Mi citas el letero de Andrzej Pettyn, kiu kelkfoje instruis dum la someraj kursoj en Karlskoga kaj en Kungälv, kaj kiu ankaŭ atentigas nin pri la graveco de tiuj kursoj. Li donas jenan konsilon:

"La kursojn povus partopreni ankaŭ pensiuloj, kiuj havas sufiĉe multe da tempo.

Cetere, se temas pri la pensiuloj, mi pensas, ke ĝuste en ĉi tiu medio (tamen ne forgesante pri gejunuloj!) oni devus popularigi la kursojn de Karlskoga pli vaste ol ĝis nun. Tio ne estas ŝerco, kion mi skribas, sed iam mi legis pri tio, ke usonaj

sciencistoj surbaze de diversaj observoj venis al la konkludo, ke lernado, sed speciale lernado de lingvoj, en maljuna aĝo vigligas la homan menson, plirapidigas la sangocirkuladon, preventas skleroton kaj konsekvence plilongigas la vivon. Iasence do (kaj ne ridu) Esperanto kontribuas al la plilongigo de la homa vivo. Eble iom ŝerce dirite oni povas konstati, ke la kursoj en Karlskoga havas ankaŭ terapian valoron... Nu, verŝajne ĉi tiel vere estas, ĉar mi vidas nun en Karlskoga pensiulojn, kiuj partoprenas aliajn kursojn, ili promenas inter la lecionoj bonhumoraj, vigle diskutantaj, ŝajne tute kontentaj, ke ili trovis por si interesan okupon. Verŝajne al ĉio ĉi kontribuas ankaŭ la bonega atmosfero, kiu regas en ĉi tiu Popola Altlernejo, bonegaj loĝkondiĉoj, familiareca prizorgo flanke de la laborantoj. Krome esperantistoj trovas ĉi tie patrecan kaj lertan instruadon flanke de Lars Forsman, kiu - kiel mi rimarkis - instruas taktoplene, bonkore, pacience kaj klopodas enkapigi Esperanton eĉ al plej hezitemaj personoj."

Mi ankaŭ volas atentigi vin pri la ebleco peti stipendiojn kaj ĉe Sveda Esperanto-Instituto (adreso ĉe Märtha Andreasson, paĝo 50) kaj ĉe SEF. La venonta kurso (daŭriga) komenciĝos la 23-an de oktobro. La kosto estas 4.000 kronoj (= 500 kronojn semajne por manĝoj, loĝejo, instruado kaj ĉarma ĉirkaŭaĵo!). Partoprenu mem kaj/aŭ varbu konatojn al tiuj valoregaj kursoj.

Karin Lindquist

Bona kongresejo kun surprizaj programeroj

La kongresejo estis – ĝenerale dirite – bona kaj la interna ekipaĵo funkciis kontentige; bona, sed malproksima, ĉar ĉiuj kongresanoj loĝis en hoteloj en la urbocentro. Specialaj aŭtobusoj (VOLVO) veturigis nin matene kaj vespere inter la hoteloj kaj la kongresejo, sen ekstraj kostoj por ni.

La *Palacio de las Convenciones* situis en bela kaj trankvila loko ekster la urbo, ĉirkaŭata de verdaj gazonoj kaj belaj arboj – do meze de abunda verdaĵo.

La diversaj salonoj sufiĉis laŭbezone, klimatizitaj kaj ekipitaj per laŭparoliloj kaj multaj mikrofonoj. Neniu havis kaŭzon plendi pro neaŭdebleco. Tamen okazis kelkfoje, ke la temperaturo fariĝis tro malvarma.

Granda parto de la kongreseja interna spaco konsistis el granda halo, koridoroj kaj restoracioj. En la halo troviĝis sofoj por babilemaj kongresanoj kaj du standoj, kie oni vendis trinkaĵojn. La halo ne estis klimatizita, sed ankaŭ ne tute fermita al la ekstero.

Tie en la granda halo, ĉe unu muro, troviĝis malalta podio, kie okazis diversaj kaj pluraj neanonciataj artistaj prezentoj ĉiutage. Orkestroj kaj solartistoj aperis, same kiel kantistoj kaj poemlegantaj aktoroj. La plej ĉarman kaj kormoligan prezenton faris infana grupo sub bonega regado de muzikinstruistino. Ŝi estas esperantistino kaj jam de longe gvidis la grupon "La fingretoj". Pro la kongreso ŝi instruis la infanojn iom paroli, sed precipe kanti tre specialajn kantojn, kaj ilia repertuaro estis granda. "La fingretoj" ankaŭ aperis sur la scenejo en la internacia vespero, sed tie la proksimeco kaj intimeco, kiun la spektantoj en la kongresa halo sentis, bedaŭrinde mankis. Troviĝas videobendo pri la grupo.

En la kongresejo du restoracioj

Kiam la aviadilo de Aeroflot surteriĝis en Havano, el la supro de la aviadilo komencis subite ŝpruci akvo, aŭ eble vaporo. Multaj ektimis, ke okazis teknika eraro en la aviadilo, speciale ĉar la ŝprucado pludaŭris. La aero fariĝis pli kaj pli saturita de malsekeco, pli kaj pli varma, preskaŭ neeltenebla. Kiam oni fine malfermis la pordojn kaj ni povis eliri, ni rimarkis, ke ekstere regas la sama varmo kaj malsekeco. La personaro preparis nin laŭgrade al la eksteraj cirkonstancoj. Ni aŭdis de kongresanoj, kiuj veturis per aliaj flugkompanioj, kiuj ne aranĝis similan preparon, ke ili preskaŭ ricevis ŝokon, kiam ili eliris.

Tiu varmo (32 ĝis 35 gradoj) kaj malsekeco (ĉirkaŭ 80%) ĉirkaŭis nin dum la tuta restado. (FL)

priservis nin je moderaj prezoj. Unu estis de memserva tipo. Kubanoj pagis per pesos, la aliaj devis pagi per usonaj dolaroj.

Krome troviĝis eĉ kvar baroj, kiuj servis kafon kaj ĉiajn trinkaĵojn. Taso da forta kafo kostis proksimume tri kronojn. La baroj ĉiam havis klientojn, sed la teleksa kaj telefona ĉambro ne. Telefonvokoj eksterlanden kostis terure multe

kaj ni aŭdis personojn, kiuj antaŭ la vojaĝo promesis telefoni hejmen, komenti, ke ili certe rompos la promesojn. Ili skribis kartojn. Kartoj bezonas minimume tri semajnojn por atingi Eŭropon. Ĉe la poŝtmarkvendejo troviĝis ujo kun gluaĵo, ĉar mankis gluaĵo sur la poŝtmarkoj.

Estis tamen bona kongresejo.

Rolando



Bertil Nilsson el Nyköping ekzercas sin en ritma kuba danco. Foto R I

Mi envas al la kubaj esperantistoj iliajn membrojn, ĉar inter ili troviĝas eminentaj artistoj, kiujn ni havis la eblecon vidi kaj aŭdi plurajn fojojn dum la kongresa semajno.

Elstaris Georgina Almanza, ne plu juna aktorino, kiu dum pluraj okazoj faris eminentajn monologojn, kaj du kantistinoj el la Opero de Havano, kies riĉegaj voĉoj plenigis la grandan kongresan salanon.

La bedaŭrindaĵo estis, ke multaj kongresanoj estis forlogitaj tiun saman vesperon, kiam ili faris sian prezenton, al tute neinteresa akvonaĝado en unu el la hoteloj, tiel ke nur centoj da spektantoj povis ĝui ilian arton. Sed ni vere ĝuis! (FL)

Sentoj bolis pri buĝeto dum komitataj kunsidoj

Komence oni timis, ke ne eblus havi komitatkunsidojn, ĉar ne estus sufiĉe da komitatanoj por havi kvorumon. Dum la unua sesio efektive estis tiel, sed iom post iom venis novaj kaj finfine la prezidanto John Wells feliĉe povis konstati, ke nun eblas labori.

La 39 punktoj en la tagordo ne ĉiam kaŭzis debatojn, feliĉe. Sed la buĝeto ankaŭ ĉi-jare igis la sentojn boli, kiel ankaŭ la financa raporto. Kiel en aliaj jaroj, mi havis la senton, ke oni diversmaniere kulpigas unu la alian, kaj ke estas personaj konfliktoj, kiuj malhelpas krei harmonian atmosferon por komune solvi la ekonomiajn problemojn de UEA. Kaj la asocio vere havas problemojn nun, pro la nova situacio en orient-eŭropo. La situacio ŝanĝiĝis ne nur por la koncernaj popoloj, sed ankaŭ por la tiulandaj Esperantomovadoj.

Novaj membroj kaj fakorganizo

La nova situacio ankaŭ donis al UEA du novajn membroasociojn – la estonan kaj la ukrainan. Kvankam la reguloj pri akcepto de novaj landaj asocioj el regionoj, kiuj ankoraŭ estas partoj de aliaj ŝtatoj, ne estas tute klaraj, la komitato bonvenigis ĉi tiujn du kiel membrojn.

Aliĝis ankaŭ nova fakorganizo – asocio por esperantistaj samseks-emuloj.

Osmo Buller post Neil Salvesen

Ĉar trafis la asocion granda perdo – mortis Neil Salvesen, la direktoro de Centra Oficejo – ni elektis Osmo Buller kiel direktoron ek de la jaro 1991. Ĉar Osmo Buller nun estas ĝenerala sekretario en la estraro, ni ankaŭ devis elekti novan

membron por tiu respondeca posteno. Ĉar neniu en la nuna estraro pretis anstataŭigi Osmon, ni elektis novan estraranon – Ian Jackson, kiu telefone akceptis la postenon.

La tago de la paco

Ĉi-jare Mark Fettes gvidis kaj ordigis la tagon de la paco. Kiel diskut-dokumenton li elektis la "Vankuveran deklaron pri pluvivado en la 21-a jarcento". Temis pri la diversaj obstakloj por bona homa vivo, kiuj ĉie en la mondo malhelpas la evoluon – militoj kaj neimageblaj kvantoj de rimedoj por militaj celoj, tro granda kresko de la homaro, detruado de la naturo kaj la biosfero, ktp.

Kelkaj invititaj homoj enkondukis la debaton per siaj personaj vidpunktoj de la situacio konekse de la dokumento. Poste la publiko estis dividita en grupojn, kiuj dum iom da tempo inter si diskutis. La rezulton oni en la fino prezentis komune. Entute bona aranĝo, ankaŭ pro tio, ke la paroladoj kelkfoje estis interrompitaj per trubadura kantado. Estis tamen protestoj kontraŭ tio, ke oni ne rajtis tuŝi temojn pripacajn, kiuj ne rilatis al la ĉeftemo. Sed post iom da diskutado la indigno kvietiĝis.

Virina agado

Elsbeth Bormann gvidis la kunsidon kune kun Spomenka Stimec. Ĉeestis trideko da kongresanoj. Inter ili ne estis kubaj virinoj kaj ankaŭ ne eblis aranĝi renkontigon kun kuba virina asocio, kiel estis planite. Estis diversaj raportoj, i a de Japanio kaj Svedio. Kerstin Rohdin raportis pri la aranĝo por virinoj en Högsby antaŭ du jaroj kaj estis propono pri nova simila aranĝo en Svedio.

La kongresa temo: Esperanto, evoluo, diverseco

Okazis sufiĉe multaj kunsidoj rilate al la kongresa temo. Gvidis la kunsidojn Jane Edwards kaj prelegis i a Humphrey Tonkin, Jinsu So kaj Ulrich Lins. Oni pritraktis la situacion en diversaj mondopartoj kaj venis multaj interesaj vidpunktoj kaj de la prelegantoj kaj de la publiko. Estis treege variaj programeroj, sed eble estus pli bone se oni estus lasinta pli da tempo por publika debato. Nun estis pluraj tro longaj enkondukoj kaj tre malmulte da tempo por spontanaj reagoj. En unu kunsido prelegis kubaj profesoroj en hispana lingvo kaj oni uzis similtanan interpretadon. Sed kvankam la interpretistoj estis tre spertaj, tio ne funkciis bone. Ni esperantistoj estas alktimiĝintaj al rekta parolo, kaj nun ni povis konstati, kiel supera tio estas kompare al interpretado. Partoprenis sufiĉe multaj kongresanoj en ĉiuj kunsidoj.

Kelkaj vortoj pri postkongreso

Mi finos per kelkaj vortoj pri la postkongreso, kiun mi partoprenis. Estis postkongreso sen speciala programo kaj sen esperanta gvidanto. Ni estis dek personoj – ses svedoj, du danoj, hungaro kaj polo. Ni veturis al "El Abra", ĉar laŭdire ne plu estis lokoj en Habanilla. Ni loĝis tre bele sub palmoj kaj kun hibiskoj ĉe porde en etaj dometoj. Ni banis nin en la maro kaj kolektis konkojn kaj pecojn de koralrifoj. Vespere ni interbabilis kaj ĝuis la mildan veteron, kontraste al la varmego dum la tago. Bedaŭrinde kelkaj moskitoj ĝenis la idilion, postlasante ruĝajn makulojn sur nia blanka haŭto.

Märtha Andréasson

Lando de cigaroj kaj sukero – kaj de amika popolo

El la radio venas la voĉo de Evert Taube. Li koveras pri sia "junulino en Havano". Pluraj bildoj pri Kubo riveligas en la kapo, sed nun dominas la vera bildo, aŭ, se ne absolute vera, do almenaŭ konkreta kaj ĝis nun plej lasta, ĉar pro lokigo de la ĉi-jara kongreso Kubo fariĝis ne-blanka regiono sur la esperantisma mapo.

"Mi eksciis", rakontas Taube el siaj infanjaraj memoroj, "ke Havano estas granda insulo en Karibio." Estis bildo sur cigarskatoleto, kiu nutris liajn fantazion kaj scivolemon.

Ankaŭ nun, samkiel en la infanjaraj de Taube, Kubo eksportas cigarojn en skatoloj kun ekzotikaj bildoj. Eĉ, ili produktigas sammaniere. En vicoj sidas tabaklaboristoj, nuntempe ankaŭ virinoj. Per rapidaj manmovoĵoj ili asortas la foliojn laŭ kvalito kaj koloro, aliaj lerte volvas cigarojn, egalmesurajn kaj egalkolorajn, jen ankoraŭ kelkaj, kiuj kontrolas aŭ enskatoligas la brunajn, bonodorajn brulotaĵojn. Ĉiuj atente aŭskultas laŭtleĝiston, kiu laŭ malnova tradicio kaj decido de la laboristoj laŭtleĝas el mondliteraturo aŭ aktualaj ĵurnaloj, de tempo al tempo interrompate de aplaŭdoj efektividataj per frapado de tranĉiloj kontraŭ la labortabloj.

Jen bildo el unu el tiuj labor-sferoj, kiuj vere gravas por la kuba ekonomio. Aliaj sferoj estas la nikel-kaj kobaltminejoj en orienta Kubo, la sukerproduktado, la produktado de laktaĵoj, la turismo.

La sukerproduktadon minacas krizo nuntempe, kiam Sovetunio ne plu kiom antaŭe aĉetos kuban sukero. Tamen la sukerkanoj kulturataj en Kubo estas plej bonkvalitaj, kaj jen almenaŭ unu motivo, kial kubanoj obstine daŭrigas ties kultivadon kaj nun esperas evoluigi aliajn produktojn krom sukero, ekzemple paperon, el la sukerkanoj.

La vizitanton surprizas, ke konsiderinde multe el la kamparo de Kubo ne estas kulturata. Klarigo estas, ke la tero enhavas tro da kalcio kaj en aliaj lokoj, en la sudo, estas grandaj areoj tro malsekaj.

En la montaroj – nu, nordskandinavo apenaŭ dirus montaroj, sed parolus pri regionoj kun verdaĵkovritaj montetoj – kaj ankaŭ sur la ebenaĵoj sin paŝtas brutoj. Ili esence estas duspecaj: Holsteinaj, t e blank-nigraj, kiuj ankaŭ ĉi tie estas la ordinaraj, kaj alia speco, kiu memorigas pri hindaj brutoj.

Interkrucante tiujn du specojn, la kubaj bredistoj estigas novajn variaĵojn, kiuj kaj abunde laktoproduktas kaj taŭge liveras viandon.

Kaj la bredistojn, imagu, ilin oni povas vidi kiel komplete ekipitajn vakerojn, kun larĝgrandaj ĉapeloj kaj ledosirmiloj sur la gamboj, rajdantajn ĉie, eĉ sur la larĝaj sestrakaj, dudirektaj aŭtoŝoseoj.

Grava fonto de enspezoj por multaj landoj nuntempe estas turismo, kaj tio signifas, ke ĉiu lando, kiu ekprovas enspezadi en tiu sfero, ankaŭ enmetas sin en tre severan konkurencon situacion. Kubo havas tiurilate kaj atutojn kaj malavantaĝojn. Atutoj estas la ĉiamsuna klimato, amika popolo kaj bonegaj marbordoj. Parta malavantaĝo estas la ankoraŭ nesufiĉaj rutino kaj konscio pri tio, kion postulas turistoj (almenaŭ el kapitalismaj landoj). Kelkfoje tiuj banalaj problemoj, kiuj ĉiam leviĝas por turistoj, povas solviĝi treege glate kun multa afableco, aliffoje tiu glateco povas iom ĝene manki. Tamen, tio estas karakterizaĵo, kiun publikaj oficistoj ĉie en la mondo bone scias krei, kiam ili tion volas.

Unu afero, kiu sendube helpas igi la vivon de eksterlandano en Kubo interesa, estas la mona sistemo. Oni povus iom simpligite kaj populare diri, ke Kubo havas ses valutojn teorie samvalorajn. Tiuj estas pesoĵoj, dolaroj, kaj kvar diversaj specoj de "certificados". La dolaroj kaj certifikadoj estas por diversspecaj eksterlandanoj. La nacieco kaj statuso (ĉu studento, diplomato aŭ ordinarulo) de la elspezanto kaj la elspeza situacio difinas en kombino, kiun valuton oni devas uzi.

Fina impresio estas, ke Kubo estas lando, kiu valoras kaj viziton kaj daŭran atenton pro interesa estonteco.

Bertil Nilsson



La kuba aktorino Georgina Almanza inter Boo Mee Lindblom kaj Franko Luin
Foto R. Lindblom

Golfo de Porkoj

Nuligita porkaĵfesteno

La Junulara kongreso kaj unu el la postkongresoj okazis samtempe en *Playa Girón* (svede 'Grisbukten'). Jam posttagmeze, la lastan tagon de la Universala Kongreso, aŭtobuso transportis la postkongresanojn al normala ĉeborda turista banloko kun centra administrejo, manĝejo kaj butikoj. La gejunuloj devis resti en Havano ĝis dimanĉo.

La turistejo ne bone taŭgis por kongreso pro manko de oportunaj lokaloj. Tio kaŭzis, ke la inaŭguro dimanĉe posttagmeze okazis ekstere sub pikanta suno. La prezidanto vokis la ĉeestantojn veni proksimen al al podio, sed multaj restis en la ombro de apuda domo.

Kelkaj prelegoj okazis dum la semajno. Ili kolektis ĝis 50 aŭskultantoj, kiuj estis plejparte postkongresanoj. La klimatiziloj forte bruis kaj ekstaris elekto inter aŭdebleco kaj aera temperaturo.

Ĵaŭde vespere ni atendis gajan programon ĉe la strando kun ludoj kaj manĝado de rostita porkoviano. Ne okazis, laŭdire pro manko de brulligno. Antaŭe oni aranĝis ian konkurson sur la scenejo. LKK ne mem prizorgis la programon, sed jam lasis tiun taskon al Cubatur, la oficiala turista agentejo, kiu disponigis orkestron kaj programvidantojn. La sola problemo, kiu vere ĝenis multajn, estis la lingva obstaklo: ili ne parolis esperanton. Du kubanoj kun fortaj mikrofonoj rapide babilegis, kaj la kompatinda esperantisto, kiu provis traduki, havis malfortan mikrofonon. Cubatur scias kiel amuzi turistojn, sed ne esperantistojn en kongreso. Kelkaj junaj eŭropaj esperantistoj, kun kiuj mi poste parolis, komentis, ke ili estis absolute malkontentaj.

En unu tago oni anoncis busvojaĝon al natura "banloko". Tio vere montriĝis esti bela loko, kie koralorifo kreis kvazaŭ grandan-

basenon. La akvo estis kristale klara kaj de iomete pli malalta temperaturo ol en *Playa Girón*. Ĝi ankaŭ estis iom profunda, pro kio naĝkapablo estis necesa. La sola problemo pri tiu banejo estis la distanco de 8 km for de la kongresloko.

Rolando

Kelkaj (ne tute ĝentilaj) vortoj pri Aeroflot

Kelkaj kongresanoj veturis hejmen per Aeroflot kaj bone funkciis ĝis Moskvo. Du horojn malfruaj ni atingis la flughavenon je la 23⁰⁰. Nia flugo inkluzivis hotelĉambron kaj ni demandis pri la hotelo. "Iru al 'flugpordo' 21!" estis la respondo.

Ni iris tien. La loko estis senhoma – neniuj deĵorantoj. Ni iris por demandi kaj oni trankvilige respondis, ke deĵoranto venos post dek minutoj.

Dek plus dudek minutoj pasis kaj ni konstatis, ke estas nokto-mezo. Du personoj iris por esplori, kaj oni vokis telefone al iu deĵoranto, kiu ne ŝatis postulojn pri hotelĉambroj, sed rejetis la telefonparolilon! Ne eblis persvadi la apudajn uniformitajn deĵorantinojn. Fine venis maljuna gardisto, kiu

elpuŝis la "delegacion" kun malservema atitudo.

La delegacio sentis kreskantan kolerecon. La horloĝo montris 00³⁰. Jen ŝildo "Transit office". Supren al malluma koridoro kaj pordo. Ne ŝlosita. Malantaŭ longa ŝranko sidis kvin virinoj parolantaj kaj trinkantaj teon. La delegacio provis klarigi sian problemon, sed ne trovis kompaton en la grupo. Unu severaspekta juna virino ekstaris, levis la brakon kaj fingromontris al la elirejo kaj diris: "Iru al la indikita loko kaj atendu tie!"

La indikita loko (flugpordo 21) ankoraŭ malhavis deĵorantojn, sed havis pli da homoj, kiuj atendis hotelĉambrojn. Kelkaj homoj denove malaperis pro trovi trankvilan angulon ie en la malluma flughaveno. Estis 01⁰⁰.

Kiam homoj, kiuj ne konas unu la alian, kolektiĝas sub tiaj malbonaj kondiĉoj, ili sentas bezonon laŭte plendi kaj preparoli la situacion. Homoj komencis konversacii kaj ni trovis, kiel kutime, ke malantaŭ silentaj vizaĝoj troviĝas tre interesaj homoj. La babilado fariĝis eĉ gaja, kaj kiam du virinoj aperis je la dua horo, ni preskaŭ sentis, ke ili ĝenas nin.

Post iom da formalajoj ni povis eliri al buso, kiu en kvin minutoj veturigis nin al hotelo. Ni devis denove vicumi, kaj la virino malantaŭ la ĝiĉeto-truo iritite postulis, ke ni aperu duope por enskribiĝi en iu ĉambro. Por ŝi ne estis interese scii, ĉu homoj konas unu la alian aŭ ne, nur interesis ŝin, ke ĉiuj aperu duope.

Finfine ni ricevis ŝlosilojn kaj poste trovis la ĉambrojn. Restis nur la laboro pretigi la liton, enmeti la lankovrilon en iun malfacile penetreblan tegajon. Tempo malsalti la lampon. Estis 02³⁰! Bonan nokton!

Rolando

Ŝako – la reĝa ludo, ludata en ĉiuj landoj

Ŝako estas nomata "la reĝa ludo" ne nur ĉar ĝin ludis pluraj reĝoj, sed ĉar ĝi estas konata en multaj landoj. Ĝi ne estas hazard-ludo, sed la rezulto dependas de la inteligento kaj sperto de la ludantoj. Ni scias ke oni ludis ŝakon en Hindio jam en la sesa jarcento post Kristo, sed la ludo povas esti multe pli malnova. Ĝi verŝajne devenas de la pli simpla dam-ludo (*dam*). La vorto "ŝako" tamen estas persa kaj signifas "ŝahon" aŭ "reĝon".

La ŝak-tabulo (*schackbrädet*) konsistas el sesdek kvar kvadratoj aŭ ĉeloj (*tutor*), blankaj kaj nigraj. Se ĝi estas mola kaj rulebla, ĝi nomiĝas ŝak-tapiŝo. La figuroj (*pjäser*) estas nomataj: reĝo (*kung*), damo (*dam*, *drottning*), kuriero (*löpare*), ĉevalo (*springare*), turo (*tom*) kaj peono (*bonde*).

La figuroj moviĝas laŭ diversaj eblecoj. La du ludantoj alteme faras movojn (*drag*). Laŭ aparta regulo oni rajtas samtempe movi reĝon kaj



turon. Tio nomiĝas aroko (*rockad*).

La celo de la ludo estas ŝakigi (*schacka*) kaj matigi (*göra matt*) la reĝon de la kontraŭulo. Ŝako okazas kiam la reĝo de la kontraŭulo troviĝas en kvadrato trafota de onia figuro. Tiam la ŝakiganta ludanto devas averti per la vorto "Ŝakon!". Se la ŝakanta (*som är schackad*) reĝo nek povas trovi sekuran kvadraton, nek ricevi helpon de alia figuro, ĝi matas (*vara matt*), kaj ĝia ludanto malgajnis la ludon. ("Mato" devenas de persa vorto, kaj signifas "morta".)

Esperanta Ŝak-Ligo Internacia aranĝas korespond-turnirojn (*korespondenschacktävling*), kaj eldonas la revuon "Esperanta Ŝako". La adreso estas: EŜLI, Széchenyi u. 31 I/4, H-6300 Kalocsa, Hungario.

Leif Nordenstorm

POR KOMENCANTOJ

Monologo

Sen troigo mi rajtas nomi min mondvojaĝanto. Oni jam transportis min per kamelo, hundosedo, per poneo, ekspreso, vagonaro, vaporŝipo, aŭtomobilo, biciklo, aeroplano, aeroŝipo kaj raketo. Sur mia fronto staras portretoj de prezidentoj, reĝinoj, patriotoj, martiroj, inventistoj, pioniroj, artistoj, komponistoj, poetoj, aviadistoj, aktoroj, romanverkistoj, pentristoj, sportistoj, kardinaloj, sanktuloj kaj pekantoj.

Mi prezentas geografiajn mapojn de la tuta mondo kaj fragmentojn pri mondopartoj. Mi montras panoramojn pri eksterlandaj golfetoj, pri drenkanaloj, riveroj, lagoj, kaskadoj, gejseroj, montoj, monumentoj, kasteloj, temploj kaj ruinoj de temploj, misiejoj, pontoj,

havenoj, doko, kluzoj, kajoj, lokomotivoj, aerostatoj, zepelinoj, velŝipoj kaj oceanŝipoj, indiĝenaj kanuoj kaj plej modernaj gigantaj aviadiloj.

Mi bildigas ĉiujn branĉojn de la sporto, ĉiajn industriojn, manlaborojn, kutimojn, sanktajn ritojn, ceremoniojn kaj paradojn kaj same preskaŭ ĉiuspecan birdon, beston, fiŝon, floron, frukton kaj legomon. Mi skize desegnas la konturojn de la formortintaj fenikso, grifo, drako, centaŭro kaj unukornulo. La herooj kaj heroinoj de la mitologio pozas inter miaj kadroj kaj mi enkadrigas la terurajn de la milito, la benojn de la paco, la sortobaton de la paŭperismo, la hororon de la malsato, la malabundon de la elmigro kaj la belecon de vira kaj virina

nudeco. Mi ilustras la travivaĵojn de Donkiĥoto, la fabelojn de la infana mondo, la legendojn, la simbolojn de la arto, komerco, paco, de la agrikulturo, de la industrio, de la armiloj, de la flagoj de ĉiuj landoj. Mi rememoras la militojn, la ekspediciojn, la vojaĝojn kaj la malkovrojn, la kreaĵojn kaj instituciojn, kiuj kreis sendanĝeran kaj feliĉan vivon. Mi estas la plej granda ilustrita kroniko de la mondo. Milionoj da junaj kaj maljunaj homoj min kolektas, miloj evitas la enuon dank' al mia diverseco, al mia nekontestebla ĉarmo. Kaj tamen mi estas nur... simpla poŝtmarko.

J. Kuipers

(el la nederlanda *Fenomeno*, julio-aŭgusto 1989)

Trezoro - Esperanta novelarto 1887-1986

Redaktis: Reto Rossetti kaj Henri Vatrè. Hungara Esperanto-Asocio, Budapest 1989, 918 p. du volumoj, 340 kr

Tiuj ĉi du volumoj certe estas unu el la plej gravaj eldonoj de la jardeko. Esperanta poezia antologio ekzistis jam dum jardekoj, do ĝia novela ekvivalento estas des pli bonvena. Ĝi enhavas novelojn de 101 verkintoj, el kiuj mi rekonas nur unu svedon, Stellan Engholm, kaj Zora Heide, kiu estas kroatino, sed sveda ŝtatano.

Kompreneble la stilo de la noveloj estas tre varia, sed ankaŭ la gusto de la legantoj estas tia, kaj ĉiu povas trovi ion por si. La kvalito kompreneble estas alta, ĉar temas pri elekto de indaj reprezentantoj por la esperanta novelarto. Tiu, kiu emas traduki novelojn el esperanto, al sia nacia lingvo, povas trovi multajn perlojn en tiu ĉi kolekto.

Malpli ĝojiga afero estas la granda nombro da preseraroj en la eldono, sed ĝi tamen meritas atenton kaj multajn aĉetojn.

Noktaj aviadistoj

Vladimir Beekman, *el la estona Jaan Ojalo*, Eesti Raamat, Tallinn 1989, 162 p.

En la sepdekaj jaroj oni trovis japanan soldaton, kiu ankoraŭ gardis iun lokon sur insulo en Polinezio. Nur post interveno de la imperiestro, kiu klarigis al la soldato ke la dua mondmilito delonge finiĝis, la soldato forlasis sian postenon kaj reiris la Japanio. Post tiu okazaĵo sekvis serion da diverslandaj libroj pri persista soldato. "Noktaj aviadistoj", kies originalo aperis en 1975, estas la estona variaĵo de tiu

temo. Kapitano Berg kaj aliaj kaŝiĝas sur insulo en Estonio, veturas per sia malmoderna LQ86-aviadilo, kaj nur iom post iom konatiĝas kun la ĉirkaŭanta paca medio. "Noktaj aviadistoj" reprezentas la popularan ĝenron de moderna estona literaturo. Kune kun deko da aliaj esperantlingvaj eldonaĵoj de Eesti Raamat, ĝi donas bonan eblecon al svedoj konatiĝi kun literaturo najbara.

La dek du noktoj de Satano

Emiano Imby (*K. Kaloczay*), *Kooperativo de Literatura Foiro*, Prilly 1990, 131 p. 180 kr.

Ne ofte povos aperi nova libro de la majstro de la literaturo esperanta, nome Kálmán Kaloczay (1891-1976). Kiom ofte dependas de la nombro de postlasitaj manuskriptoj, kiun mi ne konas. Jam longe ni sciis ke krom la humurajn kaj tradiciajn poemojn, Kaloczay verkis ankaŭ erotikajn, kiel la verkojn "Sekretaj Sonetoj" kaj "Libro de Amo", ambaŭ verkitaj preŭdonime. Al tiuj nun aldoniĝas "La dek du noktoj de Satano", duone poezia, duone proza. La scenejo rapide moviĝas inter Sodomo kaj nuntempo, inter furora enamigo kaj rutina malĉasto.

Eldono de nova Kaloczay-libro kompreneble estas kultura evento en Esperantio. La libro tamen sendube ne fariĝos klasikajo. Ĝi ne atingas la altojn de "Parnasa gvidlibro", "Eterna bukedo" kaj "Libro de Amo". Tiu kiu aparte interesiĝas pri erotika poezio tamen ne hezitu sed legu *La dek du noktojn de Satano*.

Leif Nordenstorm

Intensivkurs i esperanto

13-14 oktober i Lund

Nybörjarkurs och fortsättningskurser
på olika nivåer.

Sista anmälningdag 4 okt.

Upplýsingar:

Ann-Christine Krondahl, tel 044-32 51 64.

Arr. Södra distriktet av Svenska
Esperantoförbundet/SKS.

Pipi Ŝtrumpolonga premiita

Dum la UK en Havano Pipi Ŝtrumpolonga ricevis premion Infanlibro de la jaro en la Belartaj konkursoj. Ni gratulas al Progreso Eldonejo kaj al ĝia iniciatinto Ulf Ribers, kiu preparas la ĉi-aŭtunan eldonon de Roseanna, originale verkita de Maj Sjövall kaj Per Wahlöö.

Komputila programo

Ekzistas komputila programo por ellernado de esperantaj vortoj. "Glosnost", kiel ĝi nomiĝas, estas uzebla por la komputiloj PC/XT/AT kaj Psion Organiser II. Vi povas ricevi informojn de: Stefan Carlsson, Portlidervägen 6, 72480 Västerås.

Somere en Karlskoga

Kun partopreno de pli ol 40 gesamideanoj el Svedio, Norvegio, Britujo, Finnlando kaj Pollando okazis en Karlskoga la 5a somera



Bertil Forsman, redaktoro ĉe la radioprogramo "Vetandets värld", intervjuis en Karlskoga. Fotis: U Luin

esperantokurso. Lars Forsman kaj Iva Åberg el Svedio kaj Georgo Handzlik kaj Andrzej Pettyn el Pollando gvidis.

La kursoj pasis tre bone kaj ĉe la fino montriĝis, ke unu el la plej diligentaj lernantoj kaj plej altnivelaj estis la 11-jara Janko Luin el Stokholmo, kiu pro la bonegaj rezultoj en la lernado ricevis novan libreton de A Pettyn "Cent pri cent".


Kion oni povus konkludi pri la kursoj? Tute certe Lars Forsman faras tre utilan laboron por Esperanto. Certe la oksemajna dumsemestra kurso povas fariĝi utila tempopasigilo por iu pensiulo, ĉar oni ricevas en la Popola Altlernejo en Karlskoga bonegan prizorgon, perfektan Esperanto-instrukcion kaj tre bonajn loĝkondiĉojn. Por homoj, kiuj sentas sin solecaj kaj volus rememorigi al si la konon de Esperanto en agrabla societo, la kurso estas tre rekomendinda.

Andrzej Pettyn

... kaj en Kungälv

La internacia kurso en Kungälv 11-15 junio allogis pli ol 60 partoprenantojn. La instruistoj, Stefan MacGill, Spomenka Štimec kaj Andrzej Pettyn, instruis, prelegis kaj amuzigis la ĉeestantojn. Bertil Nilsson dediĉis sin al la komencantoj. Estis ankaŭ eta infangrupo.

Krom la instruado estis multaj kulturaj programeroj. Barbara Dluzynska prezentis la teatraĵon "La Eta Princo", la rektoro de la lernejo, Nils Zandhers, prelegis pri la nordia kulturo kaj Oksana kaj Jomart el Sovetio kantis kaj gotenbarga danctrupoj prezentis svedajn popoldancojn



Post la kurso okazis internaciaj ekzamenoj, kiujn gvidis Stefan MacGill kaj Ebbe Vilborg kun helpo de Spomenka Štimec kaj Bertil Andreasson. Kvar personoj sukcese trapasis la ekzamenon. Gratulojn al ili.

Märta Andréasson

Freinet-instruistoj en Svedio

La esperanta sekcio de la internacia Freinet-movado konferencis en Blomstermåla la 1an-la 11a de aŭgusto. Ĉirkaŭ 40 partoprenantoj de Francio, Svedio, Pollando kaj Ĉeĥo-Slovakio ĝuis ege agrablan kuneston en bela regiono de Småland. La programo de la 15a renkonto de ICEM Esperanto (Internacia Celado por Edukado Moderna per Esperanto) estis tradicio: esperan-

tokursoj antaŭtagmeze, ekskursoj posttagmeze, prelegoj kaj distraĵoj vespere.

Instruis du francoj kaj unu polo. La ĉeestintaj svedoj, el kiuj kelkaj estis veraj komencantoj, spertis kiel la deviga esperantoparolado inter alilingvanoj progresigis ilian sciadon.

Ingemar Nordin


Utländska besök under hösten och våren

15-30 september kommer esperantister från universitetet i Tomsk att resa runt i Sverige. De sjunger, dansar, berättar om perestrojka och om Sibirien mm.

3-18 november kommer två kvinnor från Estland. De kommer att berätta om Estland och sjunga estniska folksånger.

Gerhard Tobias som undervisar i Sverige i våras kommer igen. Information om tid och plats.

Vill din esperanto-klubb, din skola eller ditt studieförbund ta emot utländska gäster på turné i Sverige i framtiden, tag kontakt med **Kerstin Rohdin** (adress på sid 50).



Plej juna lernanto ĉe la somera kurso en Karlskoga: Simon Samuelsson el Jönköping. Li uzis ĉefe malsekajn literojn

Fotis: U Luin

Tra la mondo

Filmo pri Bergen

En 1991 la Universala Kongreso okazos en Bergen, Norvegio. Jam ekzistas esperanta videofilmo pri la urbo, kiun oni ekzemple povas montri dum klubkunvenoj. Prezo: 100 norvegaj kronoj. Mendu ĉe: Elna Matland, Fløenbakken 41 D, N-5009 Bergen, Norvegio.

Pola radio bone aŭdebla

Redaktoro Andrzej Pettyn, la estro de la Esperanto-redakcio de Radio Polonia, dum sia lastsomerata estado en Svedio diris al La Espero:

— Kun ĝojo mi povas konstati, ke niaj elsendoj estas en Svedio sufiĉe bone aŭdeblaj kaj kelkaj eĉ

tre bone, ekz. la matena elsendo je la 6-a horo (laŭ sveda vintra tempo) per mallongaj ondoj 7270 kHz kaj 9675 kHz (41 kaj 31 m), la vespere elsendo je la 18.30 per 7285 kHz kaj 6135 kHz (41 kaj 49 m), kaj eble la plej bona je la 22.30 per 1503 kHz 7270 kHz kaj 7285 kHz (41 m). (Somere 7.00, 19.30 kaj 23.30)

— Mi renkontis en diversaj lokoj niajn aŭskultantojn kaj mi povis konstati, ke kelkaj el ili por pli bone aŭskulti eĉ aĉetis por si novan Sangean-aparaton, kiu estas malmultekosta kaj tamen bonege uzebla por kapti diversajn radiostaciojn. Arne Andersson, fakulo pri radioaparatoj, konfesis al mi ke diverslandaj esperantistoj superŝutas lin per mendoj. Lennart Åberg diris al mi ke ĉiutaga aŭskultado donas kontakton kun la vivanta lingvouzo kaj aktualajn informojn pri la movado. Ĉiuj legantoj de La Espero povas ricevi senpagan informilon ĉe: Radio Polonia, Esperanto-Redakcio, Varsovio, Pollando.

Cetere ankaŭ la redaktoro de La Espero ĝojas ke Arne Andersson bone vendas, ĉar tio montras ke la anonco en La Espero 1990:1 estis utila.

Kristanoj en Francio

La kristanaj esperantistoj en KELI mondkongresis en Le Louvain, 16-23 julio 1990. Oni vizitis ankaŭ Kulturcentron Esperantistan en La Chaux-des-Fonds, kaj la grandan esperanto-sekcion de la urba biblioteko.

Dimanĉe ni partoprenis disevon en Neuchâtel. Ĝi estis parte franclingva, parte esperanta. Kantis la kongresa ĥoro.

Dum la kongreso okazis ankaŭ skribseminario kaj lingvokurso. Partoprenis 64 esperantistoj el 10 landoj.

Karl Buremo

Material för information och utställningar

Foldrar och informationsnummer

Esperanto - idén och verkligheten

En vacker broschyr med grundläggande fakta om esperanto.

Pris: 25:- kr för 10 ex,
75:- kr för 50 ex,
100:- kr för 100 ex.

Informationsnummer av La Espero 1990

Pris: 60:- kr för 20 ex.
Även förra årets informationsnummer finns, till samma pris.

Man har sagt mig

En artikel med intressant argumentation om esperanto.

Pris: 50:- kr för 150 ex.

Kontaktpersoner

Adresser till kontaktpersoner och föreningar i Sverige.

Pris: 20:- kr för 10 ex.

Brevkursen, brev 1

Brev 1 i brevkursen, som omfattar totalt sex brev, ger en första uppfattning om esperanto som språk. Rättelse och nästa brev kostar två frimärken.

Pris: 20:- kr för 10 ex,
50:- kr för 50 ex.

Mera om esperanto

Nyckel till esperanto

Kortfattad grammatik och liten ordlista. Med den här nyckeln i handen kan man börja förstå enkla texter! Esperantoförlaget.

Pris: 12:- kr för 1 ex,
84:- kr för 10 ex.

100 år med esperanto

Esperantos historia i korthet, liten bok. Jan Ströme.

Pris: 50:- kr för 10 ex (besökspris 7:- kr /ex).

Kor(r)espondu esperante

Postens brevvärdare av Inga Johansson och Åsa Sahlquist.

Pris: 14:- kr /ex.

38 svar på 38 frågor om esperanto

Hjälp och idéer för medlemmar som undrar hur man svarar på frågor om esperanto.

Pris: 15:- kr /ex,
50:- kr för 5 ex.

Dekaler, rockmärken, brevmärken

Brevmärken "Esperanto" i karta

En karta innehåller 35 märken.

Pris: 11:- kr för en karta,
100:- kr för 10 kartor.

Rund dekal

"Esperanto allas andra språk"

Passar på väskor, små skyltar m.m. Självhäftande, 10 cm i diameter.

Pris: 10:- kr för 10 ex (besökspris 2:-/ex).

Lång dekal

"Talas vid på esperanto"

Kan passa på t ex en utställning. Självhäftande, 50 cm lång och 8 cm hög.

Pris: 17,50 kr för 10 ex (besökspris 2:-/ex).

Affischer, provex av tidskrifter

Affischserie Esperanto,

8 st olika affischer
Texterna på affischerna ansluter sig till innehållet i broschyren "Esperanto - idén och verkligheten". De kan användas antingen som serie eller var för sig.

Format A2, dvs 64 X 46 cm, i rulle.
Pris: 30:- kr för en serie,
55:- kr för två serier.

Banderoll

3 meter lång och 60 cm hög, kan hänga över en gata eller på ett hus. Måste beställas minst två veckor i förväg.

Pris: 175:- kr.

Provex av tidskrifter

Kilovis, osorterade.

Pris: 50:- kr för 3 kg,
60:- kr för 5 kg,
70:- kr för 7 kg.

Beställ från:

Esperantoförbundet

Brunnsgatan 21
111 38 Stockholm
tel: 08-11 74 34

La plago de paronimoj en Esperanto

Sur la unua paĝo de *Heroldo de Esperanto* (n-ro 1/86) en la artikolo titolita "Aliaj Kongres-karavanoj", troviĝas frazo, kiun mi devis dufoje legi por kredi ĝin. En la kunteksto de informoj pri vojaĝkostoj por partoprenantoj en la UK en 1986 en Pekino, estas dirite, ke "la prezoj inkluzivas plenan pension en Ĉinio...".

Nu, tio ja estas novaĵo, ĉar ĝis nun laŭ mia scio neniu kongreslando estis tiel malavara, ke ĝi ebligis emeritiĝon de esperantistoj okaze de ilia vizito al Esperanto-arangaĵo. Kiu ne kredas tiun parton de la enhavo de la artikolo, konsultu sian vortaron por ekscii la precizan signifon de "pensio". La vorto "pensio" ja ekzistas en Esperanto, sed ĝia uzo en la citita frazo estas tute erara!

Estas similforma vorto en Esperanto, "pensiono", kies signifo konvenas en la koncerna kunteksto, ĉar ĝi rilatas al arango en domo aŭ hotelo por pagi inkluzivan prezon por loĝado kaj manĝado. La du vortoj, "pensio" kaj "pensiono", konfuzas multajn esperantistojn, ĉar ili estas paronimoj. Plena Ilustrita Vortaro (PIV) difinas paronimon jene: "Vorto preskaŭ samsona kiel alia, sed sence malsama." En la ekzempla frazo sekvanta la difinon, estas dirite, ke "en Esperanto paronimoj estas principe evitindaj, krom se iliaj sencoj estas tre malsamaj". "Pensio" kaj "pensiono" ambaŭ havas la nocion de pago; fakte ili devenas de la sama latina vorto, la verbo *pendere*, kiu signifas pagi.

Nun ni ekzamenu alian paroniman paron, "rakedo/raketo". Komparu la sekvajn citaĵojn ĉerpitajn el la magazino *Monato*:

a) "... sur la teritorio de Sovetunio staris jam 580 mezdistancaj raketoj." (3/82, p. 6)

b) "Misilo... estas simila al eta rakedo." (3/82, p. 22)

c) "... Sovetio ne lokos pli mul-

tajn SS-20-rakedojn en la eŭropa parto de sia lando." (5/82, pĝ. 6)

ĉ) "Korekto. Stulta eraro troviĝas en n-ro 5/82 sur paĝo 6: en la unua notico kompreneble ne temas pri rakedoj por tenisludo, sed pri raketoj. Ni petas pardonon. red." (6-7/82, pĝ 8)

d) "Ĉu vi emas ankaŭ lemi ĉine plumpilkkludi?... Raketon vi ne bezonas." (3/85, pĝ. 28)

Estas evidenta, ke la vortuzado estas tute kaosa. En la sama numero de la periodaĵo estas uzata jen "raketo" (a), jen "rakedo" (b). En citaĵo (ĉ) la redakcio konfesas, ke la uzo de "rakedo" en (c) estas erara. Tamen, en (d) okazas ankoraŭ unu eraro, ĉar en tiu kunteksto la ĝusta vorto estas "rakedo".


La paronima paro "rakedo/raketo" diferencas disde aliaj paronimoj, ĉar la signifoj estas tre malsamaj, kiel indikas ankaŭ la etimologioj. "Raketo" venas de la franca *rocket/roquette*, kiu siavice estas spurebla al la itala vorto *rocchetta*, la diminutiva formo de *rocca*, signifanta ŝpinbastonon aŭ konuklon.

La etimo de "rakedo" estas la franca substantivo *raquette*, kiu estas batileto. La "t" estas ŝanĝita al "d" por distingi ĝin de "raketo". La problemo por lernantoj kaj uzantoj de Esperanto estas memori la difinojn de la du vortoj por povi uzi ilin en konvenaj situacioj.

Ĝuste pro tiu bezono streĉi la cerbon, paronimoj kreas malfacilaĵojn. Bedaŭrinde, aŭtoroj de lernolibroj, kompilantoj de vortaroj kaj instruantoj de Esperanto ne sufiĉe ofte atentigas pri tiu ĉi speco de insidaj vortoj.

Cetere, estas ankaŭ homoj, kiuj defendas paronimojn en Esperanto. Ekzemple, d-ro Ivo Lapenna asertas, ke la fakto, ke malbonaj sciintoj de Esperanto ne scias ĝuste uzi paronimajn parojn, ne povas pravigi forigon de paronimoj en Esperanto aŭ kontraŭstaron al enkonduko de novaj, se vere necesaj. (*Internacia Jura Revuo*, 2/85, pĝ. 31).

Nun venas granda surprizo, eble ŝoko. En tiu sama numero de *Internacia Jura Revuo*, la organo de In-



Interesaj novaĵoj

Trezoro 1-2

Esperanta Novelarto 1887 - 1986 340 kr

El la serio Esperantaj Klasikaĵoj. Se vi legas ilin, vi scios iom pri la literatura historio de esperanto. Tie estas noveloj de la plej bonaj esperantaj verkistoj, ekzemple Baghy, Kabe, Eroŝenko, Schwartz, Engholm, Boulton, Szilágyi, Štívec.

Biblioteka terminaro 130 kr

Esperantaj bibliotekaj terminoj, kaj la tradukoj en kvin lingvojn (angla, ĉina, franca, germana, hispana). La libro aperis en Ĉinio, kaj redaktis ĝin i.a. Koralo, kiu vizitis Svedion pasintsomere.

Esperanto en dialogoj de Andrzej Pettyn 120 kr

Se vi partoprenis kurson de Pettyn en iu somero, vi rekonos la ekzercojn. Estas tipaj frazoj en esperanto, kaj proponoj kiel ekzerci la samon per aliaj vortoj. La libro estas dika, oni povas elekti tion kion oni volas.

Bibliografio de disertacioj

pri esperanto kaj interlingvistiko 132 kr

Jen la faktoj pri doktoraj disertacioj, kun priskribo de la enhavo kaj iom pri la verkistoj.

Esperanto el la vidpunkto de verkisto 27 kr

Claude Piron skribis interesan kajerton pri siaj personaj impresoj kiel esperanta verkisto.

Computer dictionary English-Esperanto 120 kr

Ni denove havas kelkajn ekzemplerojn de tiu vortaro pri komputilaj terminoj, kiu aperis en 1985.


Instrukciaro por kursgvidantoj de Z Tišljar 50 kr

La libro estas verkita por kursgvidantoj kiuj uzas la zagreban metodon, sed ĝi estas ankaŭ interesa por aliaj instruistoj. Maldika libro, sed kun multe da enhavo.

EsperantoCentro
Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm.

(daŭrigo sur paĝo 62)

KRUCVORTENIGMO



Horizontale

1. Konstelacio – Prepozicio
2. Li faras truojn en biletoj
3. Ekzisto – Centonoj de krono
4. Terspaco
5. Ekz. Nerono, Ĝenĝis Ĥano (radiko) – Ag'
6. Finaj' de verbo – Rilataj al malgrandaj adicirezultoj

7. Admiriga

8. Literatura rakonto – Movig'
9. Ŝategant' – Vertikala grando
10. Hejmsopiran

Vertikale

- A. Inter sepe kaj naŭe – Kategan
- B. Fritis – Elektra unuo
- C. Malekster – Havas volon

- C. Aktivigas flarsenton – Sufikso de aktiva participo
- D. Atentiga interjekcio – Malplezuranta
- E. Duona kvaron' –
- F. Trinkajo – Metal' – Far'
- G. Estas dorsosako dum marŝo – Vira pronomo
- Ĝ. Valora metal – Admirigita
- H. Malgranda rivereto (poezie) – 12-monatan periodon

La respondo aperos en la sekvonta *La Espero*.

Kompilis: Lennart Persson

(daŭrigo de paĝo 62)

ternacia Esperanto-Asocio de Juristoj, kies prezidanto tiam estis Lapenna, troviĝas misuzo de paronimoj! Jen du ekzemploj:

1. D-ro L. Dubravszky marteladas la punkton, ke esperantistoj devas lerni la uzon de paronimoj en Esperanto same kiel oni faras lernante etnolingvojn. Mi ĉerpis la sekvan frazon el la artikolo verkita de Dubravszky, kiu aperis en la menciita jura revuo:

"Miasperte tiu celo iĝas atingebla, se oni adaptas la vortojn, kiujn "Sugestoj..." entenas." (pĝ. 28)

Laŭ la kunteksto, la ĝusta vorto estas "adopti", sed Dubravszky iom

BERGEN 1991

Redan nu kan ni anmala er till nästa års UEA-kongress i Bergen 27 juli–3 augusti 1991.

Kongressavgiften i svenska kronor:

	Till 1990-12-31	Till 1991-03-31	Från 1991-04-01
1. Direktmedlem i UEA (DM, MJ och MA)	585	730	875
2. Ej direktmedlem i UEA	730	875	1020
3. Medföljande, handikappad eller ungdom (under 30 år 1991-01-01) som är direktmedlem i UEA	295	440	585
4. Medföljande, handikappad eller ungdom som själv inte är direktmedlem i UEA	440	585	730

Beställ anmälningsblankett hos **Lisbet Andreasson, Södra Rörum pl 455, 242 94 HÖRBY**, tel: 0415/50 152. Blanketten skall sedan skickas tillbaka till samma adress. All betalning sker till **pg 14 74 29 - 5**, Esperantoförbundet, Specialkonto, Hörby. Ange på talongen vad betalningen avser.

konfuziĝas pri la paronima paro "adapti/adopti".

2. Alia kolego de Lapenna, Ralph Harry, surpaperigis jenan frazon:

"... sed fine ĉiu ŝtato akceptus la decidon de senpartia jura aŭ arbitra tribunalo." (pĝ. 20)

Devas esti evidente al ĉiu, ke senpartia tribunalo ne povas esti arbitra tribunalo. Ankaŭ aliloke en la sama artikolo okazas misuzo de "arbitra" anstataŭ "arbitracia", la ĝusta vorto.

Se oni akceptus la vidpunkton de Lapenna, ke tiuj, kiuj ne scias uzi paronimojn, estas malbonaj sciencoj de Esperanto, oni devus enmeti en tiun kategorion amason da homoj, kiuj dum pluraj jaroj uzas Esperanton kaj opinias sin bonaj sciencoj de la lingvo. Se de tempo al tempo ili faras erarojn, kies kulpo estas tio? Ilia, aŭ la malfacilaĵoj en la gramatiko aŭ semantiko de Esperanto?

Dum la centjara historio de Esperanto, ĉiu generacio ripetas la erarojn de siaj antaŭuloj. Tio signifas, ke la plago de paronimoj en Esperanto neniam formalaperos, krom se oni forigos tiujn leksikajn elementojn de la lingvo. Tio estas apenaŭ ebla rilate tiujn paronimojn, kiuj estas fundamentaj aŭ oficialigitaj. Eble oni povas anstataŭigi kelkajn membrojn de paronimaj grupoj per novaj morfemoj. Tiun solvon alprenis Ido, kiel la sekvaj ekzemploj montras:

<u>Esperanto</u>	<u>Ido</u>
pesi	ponderar
pezi	pezar
oferi	sakrifigar
oferti	ofrar
nevo	nevo
nepo	nepoto

Mi opinias, ke per la ĉi-supraj citaĵoj mi montris, ke la starpunkto de Lapenna ne estas apogebla. Paronimoj sendiskriminacie stumbligas kaj bonajn kaj malbonajn sciencojn de Esperanto. Pro tio mi proponas, ke en la estonteco oni provu eviti la enkondukon de novaj paronimoj.

Bernard Golden

Kalendaro

OKTOBRO

- 13-14 Esperanto-kursoj, Lund. Vidu la anoncon en tiu ĉi La Espero
19-21 Artaj konfrontoj, Poznan (Kultura Esperanto-Centro Orbita, Os Kosmonautów 118, PL-61-641 Poznan, Pollando)
25-28 Internacia muzika renkontiĝo, Ostrava, (ĈEJ, Jilská 10, CS-11000 Praha 1, Ĉeĥo-Slovakio) (Cetere la landa parlamento ŝanĝis la skribmanieron de la landnomo al: Ĉeĥo-Slovakio)

NOVEMBRO

- 5-11 8-a Internacia metodika seminario, Kaunas, (Litova Esperanto-Asocio, SU-233000 Kaunas-C, ab. k. 167, Litovio)
11 Lingva seminario, Malmö, gvidas: Bertil Nilsson (Ann-Christine Kron Dahl, tel. 044-325164)

DECEMBRO

- 21 decembro - 11 januaro
Unua Afrika kongreseto, Togolando, Benino, Ebur-Bordo, Niĝerio, Ganao (UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando)
27 decembro - 3 januaro
7a Internacia Festivalo, (por 25-50 jaruloj kaj familioj) Sensenstein, Kassel, Germanio (Hans-Dieter Platz, Maikammerer Str 21, D-6731 St Martin, Germanio)

JANUARO

Dum la printempa semestro okazos kurso pri interlingvistiko en la Stokholma universitato. Se vi interesiĝas, tuj kontaktigu kun la lingvistika sekcio.

MARTO

- 29 marto - 5 aprilo
Printempa Semajno Internacia, Jünkerath, Germanio (Wolfgang Loose, Irisweg 12, D-4755 Holzwickede, Germanio)

JULIO

- 20-27 Internacia Junulara Kongreso, Karlskoga
27 julio-3 aŭgusto
Universala Kongreso de Esperanto, Bergen, Norvegio (vidu anoncon)

OFTE

Turismaj vojaĝoj (Esperanto-Seikcio, Tian An Turisma Servo Pekino, 8, Dong Zhi Men Nan Da Jie, Beijing 100027, Ĉinio)

NEKROLOGO

Agda Olsson

Den 25 juli avled Agda Olsson, i en ålder av 92 år. I den minnesgudstjänst som ägde rum den 7 augusti deltog, förutom släkttingarna, även medlemmar i Göteborgs Esperantoförening och Svenska Esperantoförbundet.

I sina tal tog de upp och tackade för det mångåriga arbete som Agda Olsson lade ner i esperantorörelsen

under de mer än 60 år hon verkade i Göteborg.

På grund av sin sjukdom kunde hon inte under de sista åren arbeta aktivt. Men i stället stödde hon då arbetet ekonomiskt genom frikostiga gåvor till förbundet och föreningen. Även för detta framfördes tack.

Märtha Andréasson

Sten Svenonius
Erikstorpsgatan 26 A
21754 Malmö

-2

Esperantoförbundet, Brunngatan 21, 111 38 Stockholm

Fidel Castro dum la UK

Dum la inaŭguro de la Universala Kongreso subite okazis eta ekscitiĝo sur la podio, aperis kelkaj soldatoj kaj baldaŭ post ili la prezidanto de Kubo, la konata Fidel Castro.

Pro la ĉeesto de Fidel Castro la kongreso ricevis atentigon en la kubaj radio, televido kaj gazetaro, kian UK-oj ne kutimas. Montriĝis dum la postaj tagoj, ke plejparto de la kubanoj estas informitaj pri la okazanta kongreso. Eĉ kelkaj turismantaj svedoj, kiujn mi hazarde renkontis la lastan tagon de mia restado en Kubo, bone sciis pri la esperanto-kongreso.

Pli poste en la semajno Fidel Castro invitis grupon da kongresanoj al bufedo en la prezidenta palaco. Li persone salutis ĉiujn invititojn kaj bonhumore babilis kun ili. En siaj bonvenigaj vortoj li tre favore parolis pri nia movado. "Eĉ se hodiaŭ vi ne estas multaj, ne senesperu, ĉar via ideo venkos. Kaj ĝi venkos, ĉar ĝi estras bona ideo", li diris al ni.

Inter la ĉeestantoj li vidis rektan pruvon pri la rolo, kiun esperanto jam ludas: rolon de proksimiganto de homoj. Li turnis sin al Keiko Snarberg el Jönköping, kies patrino estas japanino kaj patro svedo, kaj admiris ŝin pro ŝiaj bluaj okuloj. "La unua japanino kun bluaj okuloj, kiun mi ĝis nun vidis", estis liaj vortoj, " kaj pri tio oni povas danki esperanton."

En privata interparolo kun John Wells li nomis sin "soldato de esperanto" (en niaj vortoj 'simpatianto de esperanto'), kaj multaj volis el tio kompreni, ke li intencas lerni la lingvon. (FL)

Aŭkcio

Denove ni ricevis donace de parencoj de forpasintaj esperantistoj malnovajn librojn, kiujn ni i. a. volas sendi al alilandaj kluboj, kie mankas libroj. Por kovri la grandajn sendokostojn, ni vendas al niaj legantoj jenajn valorajn librojn, kiuj ĉiuj estas binditaj kaj en stato bona kiel novaj.

Sendu al EsperantoCentro koverton plej laste du semajnojn post via ricevo de la gazeto, enmetu paperon kun via nomo kaj adreso kaj kun mencio pri la sumo, kiun vi volas pagi por la indikitaj numeroj. Skribu "Aŭkcio" sur la koverto. Se vi sukcesos, ni sendos al vi la deziratajn librojn kaj aldonos la sendokoston.

Jen la libroj:	Presjaro	Paĝoj
1. J. Forge, <i>La verda raketo</i>	1961	147
2. F. Szilagyi, <i>Granda aventuro II (noveloj)</i>	1945	140
3. F. Szilagyi, <i>Sveda novelaro</i>	1950	235
4. F. Szilagyi, <i>Inter sudo kaj nordo</i>	1950	185
5. F. Bernadotte, <i>La fino</i>	1945	140
6. S. Engholm, <i>Vivo vokas</i>	1946	180
7. S. Engholm, <i>Al Torento</i>	1930	294
8. <i>Esperanta antologio - Poemoj 1887-1957</i>	1958	640
9. H. Sienkiewicz, <i>La lanternisto</i>	1940	207
10. A. Kivi, <i>Sep fratoj</i>	1947	360
11. S. Lagerlöf, <i>Gösta Berling</i>	1934	552
12. Bulthuis, <i>Josef kaj la edzino de Potifar</i>	1926	388
13. I. Lapenna, <i>Retoriko</i>	1958	294
14. L.L. Zamenhof, <i>Fundamento de Esperanto</i>	1963	355
15. P. Neergaard, <i>Atakoj kontraŭ ĝardenplantoj</i>	1954	234
16. L. Bastien, <i>Naŭlingva etimologia leksikono</i>	1950	317
17. E. Privat, <i>Vivo de Zamenhof</i>	1946	133
18. E.M. Remarque, <i>En okcidento nenio nova</i>	1929	252
19. M. Boulton, <i>Viŝino ĉe la landlimo</i>	1959	195
20. Jansson k a, <i>Svensk-esperantisk ordbok</i>	1934	576

Por via informo:

La numeroj 2-7 estas facile legeblaj kaj estas aĉeteblaj por kelkdek kronoj. N-ro 16 en antaŭa aŭkcio vendiĝis por 500 kronoj. N-ro 20 nuntempe estas rarajo.